

La Suda Krucio

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 63 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 septembro 1925

HERE AND THERE.

Esperanto is again being largely studied in Russia. Classes are being held in the following schools:—Kasimov, Livny, in High School; Rjev, in high school; Rubcovo; Barnaul; Taškent, in the University; Odessa, in primary schools and colleges. There is a Radio course of Esperanto in Moscow. Cooperatives are interested in Plavskoe. The fifth Russian Congress was held during August.

Readers of "Sep Rakontoj," by the well known Russian Esperantist, who hides his identity under the pen name of "Ivan Malfeliĉulo," will be pleased to know that another original work, "Sen Titolo," has been completed. Jan van Schoor, has translated "Pallister," by Felix Timmermanns. It is not announced whether these works will be immediately published.

According to a recent letter the "Orient" Esperanto Publishing Co. has been formed, with the object of publishing a monthly journal, "Oriento," and translations of the literature of the East. The issue of three numbers each of 1200 copies is guaranteed. The literary side of the venture is in charge of Inocento Serišev, whose book "Siberio" attracted much attention in 1914. If this venture is successful it will give an immense impetus to Esperanto in the East—from Manchuria to Java.

The Old Testament is shortly to be published in Esperanto. For several years a committee of experts has been engaged upon the work, commenced by Dr. L. L. Zamenhoff, inventor of Esperanto. The cost of the new version has been guaranteed by an anonymous friend of the Esperanto Association. It is not intended to be Scriptural propaganda in the usual way. The Esperanto New Testament was published in 1912, and is stated authoritatively that this version has obtained a good circulation. From the point of view of the Esperanto Society the version shortly to be published will be a standard work in the new language. (Melb. Argus).

This item is not quite accurate. The translation of the Old Testament was not only commenced by Dr. Zamenhoff, but was completed by him. It is understood that publication is to be made by the British and Foreign Bible Society and that the work of the experts has been in the direction of checking and confirming the colossal work of the majstro. There is no doubt but that the appearance of the complete Bible in Esperanto is most eagerly looked forward to.

At Messrs. Cadbury Bros. Ltd. Employees' Exhibition and Musical Festival, 10-13 June, 1925, six prizes were given for translations from and into Esperanto. There was an exhibition of Esperanto magazines, postcards, etc.

LA SUDA KRUCO. MELBURNO.

Monata gazeto pri la Esperanta
Movado.

Ni fosu nian sulkon.

Adresu ĉiujn leterojn, manuskriptojn,
ktp. al "Box 731 F, P.O. Elizabeth
St., Melbourne."

Abonojn oni povas sendi per poŝta
noto en Aŭstralio, per poŝta mandato
el Nov-Zelando kaj el ĉiuj aliaj land-
oj nur per internacia poŝta mandato
aŭ per perfektaj, neuzitaj poŝtmarkoj
de la lando, sendante la plej mal-
multajn pecojn (poŝtmarkojn) ĝis la
necesa sumo. Ni ne donas specimen-
ojn ekzemplerojn, kvankam ni vole
sendos ilin kontraŭ perfekta, neuzita
poŝtmarko, je valoro de kvin pecoj
—duono de unu svisa franko.

OURSELVES.

During the last few months many
friends, living in widely separated
parts of Australia, who are readers
of our journal, have been kind enough
to send appreciative letters to the
editor. Each of them expresses earn-
est wishes for the continuation and
prosperity of "La Suda Kruco."

As the only esperanto journal pub-
lished in Australia it undoubtedly of-
fers a means of cohesion among es-
perantists and at the same time, we
venture to hope, its articles, both es-
peranto and English are helpful and
interesting to our readers.

The administrators have always in
mind the possibility of enlarging its
pages, but to accomplish this a much
larger circulation is necessary. At
present the financial responsibility re-
mains entirely with the Melbourne
Esperanto Society, whose members
loyally and willingly make up any
deficiency. We do not think that our
subscribers are desirous that they
should continue to do this. If each
subscriber will make an effort to se-
cure at least one more subscription
our journal would be self supporting.
The administrators claim the utmost
loyalty from all esperantists in sup-
port of "La Suda Kruco." To those
who ungrudgingly are giving that sup-
port we are thankful, and believing
that the majority of esperantists wish
to see the journal progress, that they
realise that it is their magazine, we
ask each and all to make an effort
to extend its circulation. 1: by se-

curing new subscribers. 2: by se-
ing us advertising matter. 3: by
tributing interesting local and
items relating to esperanto, and 4:
taking a live active personal interest
in all things that make for progress,
peace and harmony in the esperanto
world.

FRENCH CONGRESS.

This was held at Clermont-Ferrand.
The opening speech was made by
Mathiot, principal of the Commerce
School, who later said that he would
make it possible to have Esperanto
taught at the Clermont Commerce
School. D-ro Marcombes, the mayor,
expressed his satisfaction that the
congress was being held at Clermont
and, amidst applause, said that he
would learn Esperanto. S-ro Dan-
Eyquem was elected President. The
Esperanto play, "La Morto de la de-
gito," was very successfully presen-
ed.

POLISH CONGRESS.

The sixth congress was held in
Warsaw and was attended by mem-
bers from thirty different towns.
During the Congress there was a
Esperanto concert, motor excursion
and a radio session during which
Prof. Bujwid spoke in Esperanto. The
principal items of the Congress were
papers by Leo. Belmont, on the Cul-
tural significance of Esperanto; Pro-
Bujwid, on the Paris Science and
Commercial Conference, and S-ro
Odyniec, editor of "Radio Amator"
who spoke on the mutual helpfulness
of Esperanto and Wireless.

MONDVOJAĜO DE LA ROTOR- SIPO?

Oni anoncas, ke la unua Rotor-
ŝipo estas konstruita en la Unuigita
Ŝtatoj kun bona rezultato. La ameri-
ka Rotor-ŝipo atingas rapidecon de
7 mejloj ĉe malforta vento. La gra-
Luckner intencas ĉirkaŭveturi la
Teron per ĝi kaj la ekskancelier
Cuno mem akceptis esti prezidanto
de la prepara komitato. La vojaĝo
plano estas sekvanta: Hamburg —
Vigo — Gibraltaro — New York —
Buenos-Aires — Santiago — San-
Francisco — Hindujo — Sudafriko.
[Josefo Major en Heroldo Esp.

KRONIKO.

HARBIN, MANGURIO. — En prospekto pri nova gazeto oni povas legi jene. — Nia grupo pensas pri elmigrado en Aŭstralion, por ke tie aranĝi bonan farmobienon kaj propran esperantan eldonejon de verkaĵoj pri Azio plus Aŭstralio.

GISBORNE, Nov-Zelando. — S-ino J. Low King presigis longan leteron pri Radio kaj Esperanto en "Gisborne Times" 28 Junio. Ĝi enhavis tre detalan raporton pri la Pariza Kongreso de Radioamatoroj. Nia samideanino sukcesis aranĝi por radia dissendo de Esperanto el Gisborne Radiostacio ĉiun jaŭdon la oka.

MELBURN, V. — Dum aŭgusto la tre vintra, malvarma vetero havis malbonan influon sur la ĉeesto de la membroj. Nun la vetero plibonigas kaj oni esperas ke la kunvenoj estos plimultnombro vizitataj. Je la sepa estis tre ĝinda vespero, kun kantoj kaj ludoj. Ĉe la fino la Societo donacis tridek-kvin ŝilingojn al la kaso de "La Suda Kruc." En la sekvanta kunveno post la studperiodo estis amuza ludado, kiu samtempe helpis la akiron de novaj vortoj. En la dudek-unua okazis tre vigla debato pri temo, — Ĉu la virinoj devus sin pudri? — Preskaŭ ĉiu membro parolis, kaj la kialoj, aŭ la manko de kialoj, la seriozeco aŭ malseriozeco de la diversaj parolantoj ĉio ĉitio kontribuis al la ĝuo de la okazo. Ĉu pro ĝentileco al la inoj oni ne povas certigi, sed la voĉdono donis viran jeson al la demando. Dum la lasta aŭgusta kunveno, post la kutimaj lecionoj s-ro Predl deklamis du poemojn kaj tiam klarigis kiel oni devus legi poezion, por ke ĝi estu plene komprenata kaj ĝuata.

FEILDING, Novzelando. — S-ro R. Ross instruas du kursojn; ĉeestas kelke da instruistoj.

SIDNEJO, N.S.-K. — Pere de Radio Stacio 2FC. Esperanto estis

denove disaŭdigita tra tuta Aŭstralio dum pasinta monato. Parolante al nevidita aŭdantaro je la 6a Aŭgusto, s-ro L. E. Pfahl pritraktis internaciajn konferencojn de 1830 ĝis hodiaŭ, komparante ilin kun nunaj esperantistaj, kiujn partoprenas ĉiunacianoj por diskuti iu ajn temon, ĉu ĉiutaga aŭ teknika, en sola lingvo. Alia parolado okazis du semajnojn poste en kiu la progreso en komerca sfero estis klarigita. Dua parto estas donita la 3a Septembro kaj por la sekvonta disradiado, je 17/9/25, s-ro Pfahl probable elektos lernejan kaj edukan fakon. Aŭskultu kaj raportu al "Farmer's Broadcasting Service," Sydney, aŭ al la parolanto mem. En la nova kunvenejo en "Rawson Chambers," s-ro F. T. Simon donis radio-informon al la membroj dum alparolado titolitan "Kiamaniere Radio helpis Esperanton." Enkondukante la temon, s-ro Simon diris, ke li konsideras Radio kiel unu el la plej gravaj helpiloj de nia lingvo kaj tial koncentrigas tute sian energion sur ĝi. Skizante diversajn enlandajn kaj eksterlandajn senfadenajn konferencojn kaj organizadojn elpreninte Esperanton, li direktis la atenton per citado de granda nombro da entreprenoj, precipe radio-ĵurnaloj kaj disaŭdigaj stacioj, al la nekalkulebla popolamaso kiuj regule legas aŭ aŭdas pri Esperanto, tiamaniere igante intereson kaj finfine kaptante ilin kiel amikoj kaj propagandistoj de nia afero. La parolanto konsilis fortan agadon inter radiuloj ĉiuspecaj.

S-ro D. B. Thomson, Ipswich, Queensland, kaj Mrs. Ruby Jefferies, Surrey Hills, lastatempe gajnis la diplomon de la B.E.A.

At the request of the professorial board the Minister for Education has appointed s-ro A. Pitlik lecturer in Esperanto at the Prague Polytechnic School.

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Porta ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon POB VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Memoru la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

EL LETEROJ DE VOJAGANTA AŬSTRALIANO.

Jen kelkaj vortoj pri la vojaĝo, kiuj eble interesos vin. Mi estas bonŝanca, ĉar mi sola okupas trilitan kajuton, sur la "Euripides." La manĝaĵoj estas bongustaj, kaj la fumĉambro ampleksa kaj komforta. La vetero estis bela, krom du tagoj, kiam ventego blovis, kiu multe balancigis la ŝipon, kaj suferigis la teramantojn. Tial mi estas feliĉa kaj multe ĝuis la vojaĝon, el kiu la unua parto baldaŭ finiĝos, ĉar post du tagoj mi atingos Capetown. . . .

La haveno de Durban estas bela kaj ankaŭ la vetero je nia alveno. Sur la kajo staris kelkdekoj de indiĝenoj, kiuj atendis ŝargi la ŝipon per karbo. Poste ili tiris grandajn fersargilojn laŭ de la kajo, kiam unu el la pasaĝeroj ĵetis kelkajn monerojn sur la kajo. Tuj ĉiu lasis sian laboron por kapti la monon kaj por fari tion ili baraktis inter si. Estis tiel amuza, ke tuj kiam ili denove komencis la laboron, alia pasaĝero ĵetis kelkajn monerojn; tuj denove la baraktado komencigis kaj tiel plu; ĉiam la pasaĝeroj atendis ĝis kiam la laboro komenciĝis kaj tiam denove ĵetis monerojn ĝis la estroj koleriĝis kaj venigis kelkajn indiĝenajn policianojn, kiuj portis bastonojn kaj batis la laboristojn. Ĉar dum la ŝargado la ŝipo multe malpurigis, mi, kun kvar aliaj, decidis dormi ĉe hotelo tiun nokton. Ni luis "rickshaws" kaj veturis al Hotelo "Edward," kiu troviĝas tre proksime al la Indiana Oceano. Poste per aŭtomobilo ni iris al Riverside, kie ni vidis eble cent simiojn sovaĝajn, kiuj tamen tiel alkutimiĝis al vizitantoj, ke ili volonte manĝis fruktojn el niaj manoj kaj eĉ ŝtelis la frukton de malantaŭ ni, dum ni donis al alia. Ĉar ili vagas laŭvole tra la arbareto tiuj ĉi simioj estas belaj kaj tre puraj kaj aspektas tute difference de la simioj, kiujn oni vidas en Melburna Zoologia Gardeno. Poste ni veturis al la "Valo de Mil montetoj." La vidaĝo estas ja bela, kaj survoje ni vidis multajn indianojn kaj zuluojn kiuj kampfestis, ĉar estis festa tago kaj aroj da infanoj dancadis kaj kantadis. Oni diris ke ili ekzercadis sin ĉar je la 3a junio venos la Prince of Wales.

La duan tagon ni denove veturis aŭtomobile kaj iris suden al Karri-

dene. Survoje ni traveturis tre grandajn sukerkampojn, kaj tie ĉi la sukerkano kreskas ne sole en la valoj, kiel kutime, sed plej ofte sur la flankoj de montetoj. Ni vizitis kelkajn zuluovilaĝojn. La rondaj domoj fariĝis el bambuo kaj herbo estas tre strangaj, sed tre taŭgas por la klimato. Troviĝas nur unu malgranda pordego kaj tute mankas fenestroj. La veturigisto informis nin ke tiuj domoj estas malvarmetaj en la somero kaj varmaj en la vintro. En la vilaĝoj la zuluanoj portas tre malmulte da vestoj. Ili ĉiuj estas grasaj, kaj ŝajne feliĉaj.

Sur la ŝipo estas multaj amuzajoj. Mi estis bonŝanca, ĉar mi gajnis du el la konkursojn kaj ricevis premiojn. Sur la ŝipo mi ofte parolis al la pasaĝeroj pri Esperanto kaj du el la viroj tiel interesiĝis, ke ili komencis lerni ĝin. Mi denove skribos poste. Kun amikaj salutoj al ĉiuj el la klubanoj, fidele via, Percy T. B. Hudson.

GRANDANIMA OFERO!

Estas ĝenerale sciata inter Esperantistoj ke s-ro de Saussure, sub la kaŝnomo de "Antido," konstante proponas ŝanĝojn en Esperanto kaj apenaŭ la inko kun kiu unu propono estas presita sekiĝis eldonas novan, kiu nuligas la antaŭan. Sub dato Junio lasta li dissendis proponon de ortografia reformo de Esperanto. Li diris:—Antaŭ kvar monatoj mi publikigis projekton de reformo de Esperanto, nomitan "Nov-Esperanto." Tiun projekton mi ankoraŭ nun konsideras, kiel la plej bonan kaj la plej kompletan solvon por reformi Esperanton. Tamen, konsciante ke la ĝenerala akcepto de Nov-Esperanto de la Esperantistoj estus tre malfacila tasko . . . mi hodiaŭ proponas . . . projekton de reformo pure ortografia. Tiu sistemo estas facile akceptebla Mi do deklaras, ke, se la Esperantistaro akceptos tiun novan ortografion . . . mi definitive revenos al Esperanto. Sed, se tiu propono ne estas akceptata, mi restos Nov-Esperantisto.

La Esperantistaro certe ne rapidigos sin por kontentigi s-ron Antido, kaj li estos kondamnata resti Nov-Esperantisto, — ĝis eble post du-tri monatoj, kiam li elkovos tute novan "sistemon."

LIBROJ RICEVITAJ.

Quedlinburg. Ilustrita gvidfolio. 6 pp. Eldonita de "Städtisches Verkehrsamt Quedlinburg" kaj de Esperanto-grupo "Kaiserhof."

La Anĝeluso. Solkanto por meza voĉo. Vortoj: Hugues Lapaire; Esperantigita de F. de Menil muziko de F. Fourdrain. 2 Fr. fr., Deiss & Crepin, 31, rue Meslay, Paris III.

Historio, instruoj kaj valoro de la Baha'i-movado. Publikajoj de la de la Esperanto-komitato de la Baha'i-movado, Hamburg, No. 1.

Oficiala Jarlibro de la Esperanto Movado — Tio estas la bone konata jarlibro de la U.E.A., kion ricevas nur la membroj de la Asocio. La nuna eldono montras, ke la Esperantistoj havas veran enciklopedion kaj ĉi tie povas trovi informon, kiun ili vane serĉus aliloke.

OUR SUPPORTERS.

Mr. Petro Dean, Dargaville, N.Z. — "my subscription to 'The Suda Krucio.' I wish it long life and hope increase in size will come."

Miss Phyllis Abbott, Harkaway. — "Enclosed my subscription. Thank you for sending along the little paper which I look forward to each month."

Miss McCabe, Loch. — "La Suda Krucio" is small, but its contents are interesting.

HOW TO TRANSLATE.

The exercises in translation inaugurated by Mr. George Gordon, F.B.E.A., have been the means of imparting much information to those who have joined the "Rondo." The second year has now commenced and as there is no limit to membership no one is denied the opportunity for improvement. It is surprising that isolated students, who are debarred from the benefits of club study, do not make greater use of this means of more rapidly mastering the language and, incidentally, of receiving the invaluable advice of such a master of translation as Mr. Gordon has shown himself to be. Miss B. K. Blyth, 10 Victoria Avenue, Surrey Hills, Vic., is the secretary, and will be pleased to explain the method of working to those interested.

ESPERANTO ĈE LA LERNEJOJ.

Laŭ peto prezentita de s-ro E. Bouteaux, deputito, je la nomo de 52 el siaj kolegoj kaj de s-ro Kempf, prezidanto de la Komerca Ĉambro de Paris, je la nomo de tiu-ĉi kompanio, la franca Ministro por Publika Instruado forsendis al la Rektoroj, la 19-an de Junio 1925, cirkuleron kiu formale nuligas la cirkuleron de s-ro Berard de la 3-a de Junio 1922 kaj per kiu de nun estas permesata organizo de kursoj pri Esperanto ĉe la publikaj lernejoj.

SENKULPIGO.

Nia presisto ne estas Esperantisto. Tio estas bedaŭrata. Spite de tio, lia laboro super "La Suda Krucio" estas sufiĉe kontentiga. Tamen, li iom fuŝis la aranĝon de la aŭgusta ekzemplero. Sur paĝoj 12 kaj 14 la dekstra kolono devas esti legata antaŭ la maldekstra. Ni kredas, ke neniu leganto havis ĝenon pri la eraro, sed ni volas klarigi kiamaniere ĝi okazis kaj esprimi la esperon ke ĝi ne ripetiĝos.

SPECIAL ANNOUNCEMENT.

ESPERANTO BOOKS AT
REDUCED PRICES.

Parcel No. 1—Krestomatio (Zamenhoff), Elektitaj Humoraj Rakontoj, 6/6.

Parcel No. 2—Millidges Dictionary, Serĉado por la Ora Saflano, Tra la londo (No. 1), 8/6.

Parcel No. 3—Hyde's Guide, Edinburgh Pocket Dictionary, 1 Packet Esperanto Post Cards, 4/-.

Parcel No. 4—Nova Testamento, Alegorioj el la Naturo, Abismoj, 5/-.

Parcel No. 5—Tatterly, Batalo pri la domo, Grammar and Commentary (Cox), 6/6.

For a limited period only.

Postage must be added to all remittances (1d. in the 1/-).

Melbourne Esperanto Society, Box 731F, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ 1925.

En la ĉarma perlo de la Mediteranea Maro, la bela baleara ĉefurbo, Palma aŭ Ciutat de Mallorca, okazis solene floriade kaj laborefike la nunjara Kongreso de la Katalunlingvaj Esperantistoj kun la tradiciaj Internaciaj Floraj Ludoj.

Ĝi estis granda sukceso. Kaj pro la kuraĝo kaj lerteco de ĝia organizinto, la bravo samideano el Mallorca, inĝeniero Narciso Bofill, la aŭtoritativo ne kuraĝis malpermesi ĝian okazigon malgraŭ denuncoj al ili senditaj kontraŭ Kataluna Esp. Federacio. Sed kontraŭe ĝi estas unuanime rekonita kiel pure esperantisma organizacio por teritorioj de katalunlingvanoj.

Floraj Ludoj, festeno kaj ekskursoj estis vere ravaj. Ĉie evidentiĝis la energio, la malavaro kaj fervoro de la prezidanto de la Organiza Komitato.

Ĉeestis premiitaj verkistoj el pluraj landoj: Josep Berger el Ĉeĥoslovakio, Emma L. Osmond el Anglujo, kaj aliaj eksterlandaj gesamideanoj, nome Anna Hrbáčková el Zlin, Fikrie el Bratislava Drino Grogan el Anglujo, kaj la sekretario de la Centra Komitato, Robert Kreuz. La nombro de samideanoj veturintaj al Mallorca estis pli ol cent. La festenon ĉeestis 170. Ĉiuj ĵurnaloj kaj gazetoj el Mallorca eĉ tagojn post la kongreso publikigis favorajn impresojn pri nia movado kaj laŭdojn al la antaŭeniga laboro de la loka pioniro Narciso Bofill.

En la Floraj Ludoj rimarkiĝis kiel poetoj la katalunoj kaj hungaroj, kaj kiel prozverkistoj la rusoj.

Belga samideanino S-ino Maria Elsworthy-Posenaer akiris premion por sia rakonto La Malnova Domo. Al Jan Van Schoor ankaŭ estis aljuĝita premio por lia poemo Je l'nova jaro.

It is reported that a petition signed by 7,000 people has been adopted in both Houses of Parliament in Japan urging the Government to consider the introduction of the study of Esperanto in the Japanese Schools.

The Daily Herald, one of London's leading newspapers, is now publishing a paragraph in Esperanto two or three times a week.

KONSTANTA REPRESENTANTARO.

It will be remembered that at the 11th Australasian Congress, held in Melbourne last Easter, Mr. O. C. Faraker was appointed the representative of the Australasian Esperanto Association. Mr. Faraker has intimated that he will be pleased to act and feels highly honoured by the appointment.

HISpanUJO PERMESAS TELEGRAMOJN EN ESPERANTO.

Kvankam Esperanto ankoraŭ ne estas permesota kiel "klara" lingvo en Hispanujo, oni povas uzi ĝin kiel limigita en la suba cirkularo dekretita de la Ĝenerala Direkcio de Komunikoj.

— Kiel respondon al skribpeto prezentita al tiu-ĉi Direkcio, de sinjoro Prezidinto de la IIIa Kongreso Esperantista, ĵus okazinta en Kordovo, je dato de la 12a nunmonata, mi estas decidinta, ke en la telegramoj por la enlanda servo estu akceptata la nomita helpa idiomu Esperanto, laŭ la limigoj postulataj por tiuj, kiuj estas redaktataj en sekreta lingvaĵo, tio estas, telegramsendantoj, devus prezenti, sur sia respondec, la koncernan tradukon ĉe la telegrafstacioj kie ili estos prezentataj, ĉiam kiam oficeistoj konantaj la suprediritan idiomon tie ne deĵoras.

Madrido, la 15an de junio 1925a.— La ĝenerala Sekretario, Castanon.

Al sinjoroj ĝenerala Inspektoro kaj Ĉefoj de la Centroj, Sekcioj kaj Telegrafstacioj de l' Regno.

[“La Suno Hispana.”]

FAMOUS DANISH LINGUIST.

Unu el la plej mondfamaj lingvistoj estis la dano Rasmus Kristian Rask. Li naskiĝis la 22 novembro 1787 en mizera, pajlotegmentita domo en vilaĝo Brandekilde apud Odense.

— Por ni esperantistoj interesa estas, ke oni antaŭ kelkaj jaroj inter la paperoj de Rasmus Kristian Rask, konservitaj en la “Reĝa Biblioteko” en Kopenhago, trovis notaĵojn de li pri la neceso de artefarita universala helplingvo. Estas feliĉo, se la popoloj havus komunan helplingvon, sed ĝi devas esti artefarita, ĉar oni ne

povas uzi la naciajn lingvojn, — li skribis. Li skizas la planon — kaj estas mirinde: Esperanto estas preskaŭ formita, kiel li pensis: Radikvortoj de la naciaj lingvoj, simplaj kaj klaraj gramatikaj reguloj ktp. Pro nekonata kaŭzo Rask ne daŭrigis la laboron, — kaj unue D-ro Zamenhof prenis sur sin — certe sen kono pri la pensoj de Rask — la gravegan laboron elverki nian lingvon. Tiel la danaj esperantistoj ekskursis al la naskiga vilaĝo de Rasmus Kristian Rask dum la kongreso en Odense pentekoston 1925.

LA NOVSPIRITA MOVADO.

Ekkoninte la necesecon, enkonduki Esperanton ĉe interkomunikiĝo kaj interrilato kun eksterlandaj amikoj kaj internaciaj Novspiritaj oni decidis, rekomendi kaj propagandi la Esperantan lingvon en pli ol 12,000 ekzempleroj en tuta mezeŭropo disvastigita novspirita Organo "Die Weisse Fahne" (La Blanka Flago).

Elsendita ekzemplero enhavas redakcian programan artikolon pri esperanto.

Parto de la gvidantaj membroj en tiu en ĉiuj landoj disvastigita movado jam de longa tempo ankaŭ estas Esperantistoj, kaj antaŭ nelonge la I.N.T.A. (Intern. Novspir. Asocio) komencis tradukigi kaj eldonigi gravajn verkojn el la Novspirita Literatura en Esperanton (Ekz. "Penspotenco" k.a.)

KURIOZA FENOMENO.

En Centra Ameriko, oni observas strangan, kuriozan, belan fenomenon: elmigradon de papilioj suden, preter la istmo de Panama. Je la fino de junio, ja oni vidas iujn el tiuj insektoj flugantaj super la maro; tagon post tago, pligrandiĝas ilia nombro, kaj dekkvin tagojn poste, la insektoj formas verajn nubojn, kiuj obrigas la teron aŭ maron.

La spektaklo estas belega, kaj la sunaj radioj vidigas, ludante kun la movebla maso da verdaĵ kaj oraj flugiloj mirigantan kolorsaĝon. Kiam la vento blovas orienten ĝi puŝas la insektojn super la teron, kaj oni povas kapti ilin milope, Multenombraj hirundoj kaj paseroj akompanas la in-sektaron. Oni ne scias de kie ili venas, kaj kien ili flugas.

—El la suno Hispana.

AŬSTRIA STATA EKZAMENA REGULARO POR ESPERANTO.

La Ministerio por Instruo en Vien (Aŭstrio) eldonis ekzamenan regularon por la instruado de Esperanto ĉe publikaj mezaj lernejoj kaj por dokumentado pri la scipovo de Esperanto. Specialaj ekzamenaj komisionoj estas nomataj por arango de ekzamenoj por akiro de dokumento pri scipovo de Esperanto (lingva kapableco). La direktoro, se necese ankaŭ vicdirektoro, kaj la ceteraj membroj de la komisionoj estas nomataj de la instruministro por la daŭro de tri jaroj.

La ekzamenoj estas aranĝotaj dufoje ĉiujare, en printempo kaj en aŭtuno; ili estos publikaj.

La ekzamenoj estas buŝaj kaj skribaj.

La unuopaj parto—ekzamenoj estas cenzurotaj per la cenzuroj: tre bone, bone, sufiĉe kaj nesufiĉe. La tutrezultato estas cenzurota per cenzuroj: kapablega, kapabla, nekapabla. Kaze de malfavora rezultato, ripetaj ekzamenoj povas esti konsentataj post duona aŭ tuta jaro.

PROJEKTO PRI LIGO DE NACIOJ EL LA JARO 1461.

En la jaro 1461 ĉeĥa reĝo Georgo ellaboris grandan programon, kies bazo estis unuigi 117 tiamajn ŝtatojn en "Ligo de kristanaj nacioj" por starigi regulon, ke la membroj de "Ligo" ne devas solvi siajn konfliktojn sange, tio estas milite. Por tiu ĉi ideo reĝo Georgo energie laboris kun sia ministro de eksterlandaj aferoj Ant. Marini kaj gajnis por siaj planoj reĝojn francan kaj polan. La franca reĝo Ludoviko XI. donis al la ĉeĥa reĝo Georgo plenan povon trakti pri la projekto en la nomo de Francujo kun la reĝo magiara kaj kun Venecilando. En la jaro 1464 granda ĉeĥa delegitaro sub gvido de kavaliro Kostka z Postupic veturis Parizon por realigi ĉi tiun ideon. Tiuj ĉi penoj trovis multajn partianojn, tamen la ideo ne estis tiame efektivigita, ĉar estis multaj posedantoj de ŝtatoj, kiuj ne volis limigi siajn dezirojn por rabado, ilia ofte sola enspezo . . . Kiel hodiaŭ . . .

—El La Progreso.

PLANTA OLEO POR MASINOJ.

Childrens' Newspaper, London raportas: Oni timas pro forkonsumiĝo de natura oleo kaj pensas je uzo de planta oleo, kiu povas esti kreskigata. La oleon de la Aŭstralia eŭkalipto oni jam sukcese provis. Tiun ĉi novaĵon ni envicigas al la aliaj kuriozaĵoj.

—el Esperanto.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Belga Esperantisto, 123, 4; British Esperantist, 244; Bulgara Esperantisto, 19; Heroldo de Esperanto, 48, 49, 52, 53, 54, 55; Homeco, 2; Informservo de la Internacia Labour Oficejo, 94a, b, c; International Language, 7; Kristana Espero, 1, 2; La Suno Hispana, 98; La Revuo Orienta, 7; Oomoto, 6; Revista del Ateneo, 10; La Nova Tago, (Internacia Baha'i-Esperanto-gazeto kvaronjare publikata per la Esperanto-komitato de la Baha'i-movado Hamburg); Unua Jaro, No. 1.

SUBSCRIPTIONS.

Up to 31st August the following sums were received:—H. H. Gregory, 5/- (8/26); J. L. King, 5/-, (8/26); S. Trewin, 4/6 (9/26); W. L. Waterman, 4/6 (6/26); W. McGuigan, 5/- (7/26); V. Irwin, 4/6 (4/26); F. T. Simon, 4/6 (6/26); K. Takahasi, 5/- (6/25); P. Dean, 10/- (6/27); A. Church, 5/- (12/25); P. Abbott, 4/6 (6/26) kaj 5/6 anonco pri Berwick Grupo; Rev. J. B. Galloway, 4/6 (3/26); E. Chisholm, 4/6 (3/26); Cash sales, 1/8.

DONATIONS.

Melbourne Esperanto Society, 35/-; Miss Colwell, 2/-; Mr. Simon, 25/-; Miss Harwood, (per Mr. H. Byatt) £2/2/6.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso: Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Hardware Chambers, 350 Little Colline-str. vendrede vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str., Hobart.

"Iru Antaŭen"-Grupo. Prezidantino S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejo: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy 8 horo, merkrede; progresintoj, 27 Hay-str: 8 horo lunde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas. Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunton St., East Malvern, merkrede vespere je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583) Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretariino S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Chambers, Little Collins Street, Melbourne, by McLean Publishing Co., Oakleigh.